# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de Ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 20/06/2024 sescentnaŭdekdua eldono (unua eldono 26/09/2011)**



**Subtenu vian Novaĵleteron**

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**

**Pri 3ZZZ** En la elsendo de la 17a de junio troviĝas informoj pri Esperantujo : kiu estas Dina Grigorjevna Lukjanec, kiujn projektojn havas la Kooperativo Literatura Foiro .

Krom tio estas informoj pri kiel konservi bonan memorkapablon , kiel deĉifri hieroglifojn per moderna metodo kaj pripensoj pri la klimatŝanĝo pro malfruo de la florado de sakuroj ĉi tiun jaron



*Franciska Toubale*

# AEA-estrarkunveno Ĵaŭdo, la 13-a de junio 2024

Ĉeestis:Jonathan Cooper, Heather Heldzingen, Joanne Johns, Sandor Horvath, Bradley McDonald, Caroline Turner

## (1) Somerkursaro 2025

La preparado daŭras.
Verŝajne, Hoan el Vjetnamio refoje venos por instrui.
Nia limdato por informi St. Ann's pri la "finaj" ciferoj de la partoprenantoj.
…. Granda defio por reklami ke almenaŭ 40 homoj partoprenu.
Bonvolu helpi.
Eble, kelkaj Nz-anoj venos.
La informo pri la somerkursaro 2025 estos sur nia retejo post kelkaj tagoj.

## (2) Esperanto Domo en Melburno

Ni daŭras la serĉadon

## (3) Prelegserio – dimanĉe, la 16-a de junio je la 17:00

**Araksaja ELBAKJAN (Armenio)**

**Armenio – antikva, ŝtona, verda – muzeo sub ĉielo**

Tiu prelego enhavos iom da informoj pri antikva historio de Armenio, ĝia naturo, arkitekturo, arto kaj popolo.

**Venonta estrarkunveno** Ĵaŭdon, la 27-an de junio 2024 je la 17:00 (16:30 en SA)



*Sandor Horvath*

# Esperanta Retradio klaku la bluajn vortojn



Donas bonan Ĉirkau -5 minutan aŭskultadon kaj legadon Ĉiun tagon

Ne estas facila elekti el la ĉiuj tagaj programoj     Do aŭskultu ĉiujn.

AI-MODELO TRADUKAS PLI OL 200 LINGVOJN 13 DE JUNIO 2024 (*ROGER SPRINGER*)







Lastatempe, BES membro, Linda Danzer, partoprenis en la loka Flora-Artekspozicio kaj ŝi gajnis du ĉampionajn trofeojn!



*Petro Danzer*

## Kolego-Esperantisto ĉu vi loĝas en Aŭstralio?

*Le jeu. 30 mai 2024 à 04:13, Tite Sinarinzi <titesinarinzi01@gmail.com> a écrit :*

Saluton. Kiel vi fartas? Mi bonfartas . Mi nomiĝas Sinarinzi Tite. Mi loĝas en Burundo. La lando estas en Afriko (orienta afriko). Mi estas Esperantisto. Do mi estas feliĉa rete renkonti vin.

Dankon *Tite Sinarinzi*

Karaj,
Eŭropaj elektoj. Jen reklamfilmeto por instigi personojn voĉdoni por la partio Europe Democratie Esperanto. La filmeto estas en la franca lingvo, sed vi povas enŝalti subtekstojn en Esperanto. https://www.youtube.com/watch?v=IR43AX1qfXA



Amike, Nicole *Nicole Else*

Mardon la 11an de junio 2024 Ewald Schick , vizitanto de Austrujo, vizitis la kurson, kiu okazas ĉiun semajnon en la Universitato de la tria Aĝo de Knox. Estis oportuno malkovri la urbon de Ewald, Graz, dank'al la broŝuro eldonita de la turisma servo de Graz, ankaŭ en Esperanto . Unuafoje Sharon , komencantino, povis paroli en Esperanto , en la ĝusta situacio t e inter nesamlingvanoj .



*Franciska Toubale*



sur la foto: je la maldekstra flanko de la tablo Ewald Schick , je la alia flanko Sharon Pulse kaj John Fleming

## Rusaj batalŝipoj envenas la ĉefan havenon de Kubo



en kio ŝajnas esti montro de forto de Moskvo meze de pliigitaj streĉitecoj kun Usono.